

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

EN TIU ĈI NUMERO:

La Flamo de Venĝo
Mongolia Loĝantaro Iras al Prespero
Referenco de la Ĉina Klasika Teatro
Ne Dolĉas Melono Deskrita Perforte

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo VOL. II N-RO 2
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio FEB. 1951

Frakasu La Usonan Intrigon Rearmi Japanion

Manifestacias Minoritatoj

Je la 30a de januaro 6,000 reprezentantoj de la naciaj minoritatoj okazigis manifestacion en la ĉefurbo.

La subĉiela aŭditorio estis plenigita de reprezentantoj de dekkvin minoritatoj mahometanoj, mongoloj, tibetanoj, ujuviroj, tataroj, miaoj, meĉoj kaj aliaj. Malgraŭ iliaj diversaj multkoloraj naciaj kostumoj kaj iliaj diversaj lingvoj, ili konkrete elmontris solidan unuecon de la ĉina popolo en sia batalo gardi siajn "fruktojn de liberigo" kaj paco de Azio kaj la mondo.

Deklaracio de Junuloj

Je la 1-a de februaro, la Centra Komitato de la Ĉinia Novdemokratia Junula Ligo, la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Junuloj kaj la Tutĉinia Federacio de Studentoj publikigis kune deklaron kontraŭ la Usona intrigo rearmi Japanion.

"Ni ĉinaj junuloj kaj popolo," la deklaro diras, "ankoraŭ memoras la longdaŭran lukton kaj pezajn oferojn kiujn ni faris por venki la japanan imperismon, nian plej ferocan malamikon. Ni neniam toleros Usonon rearmi Japanion kaj revivigi ĝiajn agresajn fortojn." La deklaro akcentas ke ĉi tiu Usona intenco utiligi la japanan popolon kiel kanonifurogon en sia agreso kondukas Japanion al detruigo.

"La japanaj junuloj kaj popolo," la deklaro daŭrigas, "jam levigis per kontraŭi la kriman agon de Usono kaj postuli ĉiuf flankan paĉtraktaton. Tio estas esprimo de ilia volo vivi paco kun la ĉinoj kaj rifuzi reiri la malnovan vojon de japana militarismo."

La ĉinaj junuloj unuigis kun junuloj en Japanio kaj aliaj landoj en la Oriento en la lukto por ĉiuf flanka justa paĉtraktato kaj demokrata Japanio, konkludas la deklaron.

Organiziĝis Budaistoj

Je la 2a de februaro, pli ol 2,000 budaistoj, inkluzive monaĥojn, monaĥinojn kaj lamaojn en Pekino kolektiĝis por manifestaci kontraŭ la Usona intrigo rearmi Japanion. Formiĝis Komitato de la Budaistoj por Mondpaco kaj kontraŭ Usona Agreso en la amaskunveno, kiu finiĝis per parado tra la stratoj de la ĉefurbo.

Budaista pastro Kjuzan (巨尊) diris, "Ni budaistoj sciigos al la imperiistoj ke ĉiu viro kaj virino, kia ajn lia aŭ ŝia religia kredo, decideme defendos Ĉinion kaj kontraŭos Usonan agreson."

Fiaskinte en sia aventuro en Korcio la Usonaj imperiistoj nun klopodas realigi sian alian agresan paŝon en la Oriento. Ĝi intencas kontrakti apartan paĉtraktaton kun Japanio por revivigi tiun imperiistan landon en la Oriento kiel ĝian fidelan lakeon en ĝia entrepreno konkeri tutan Azion kaj sklavigi la Aziajn popolojn. Tamen neniam imperiista intrigo povas eviti la viglajn okulojn de la ĉina popolo.

La Usona intrigo rearmi Japanion jam altiris seriozan atenton kaj kontraŭstaron de la ĉina

popolo. Ĝi tiu kontraŭstaro estas tre natura, ĉar tro peza estas la katastrofo, kiun trudis al ni la japana imperiismo ekde la 18a de septembro, 1931. La amara memoro estas freŝa ĝis nun. Post ok jaroj da malfacila rezistimilito, la ĉina popolo fine venkis la japanan invadanton, faliĝis la plej ferocan malamikon de Ĉinio dum duona jarcento. Kaj nun Usono intrigas denove armi Japanion por plue invadi Ĉinion. La ĉina popolo ne povas tion ignori. Por defendi nian sekurecon, niajn urbojn, niajn samlandanojn, niajn kamparojn, ni unuigas por decideme kontraŭbatali la kriman intrigon de Usono rearmi Japanion.

Paradas Virinoj

En la posttagmezo de la 28a de januaro, pli ol 40,000 virinoj de Pekino paradis tra la ĉefaj stratoj sub sennuba ĉielo, portante milojn da ruĝaj flagoj kaj portretoj de popola gvidantoj tra la tuta mondo.

Inter la paradantoj estis miloj da laboristinoj kaj kamparanoj, virinoj en uniformoj de la Popola

sekurecon de Ĉinio, Sovetunio kaj ĉiuj pacamaj landoj en Azio kaj ankaŭ Japanio mem.

Kiam ĉi tiu letero estas skribata, ni jam vidis ke 3,000 laboristoj de Curumi-a Ŝipkonstrua Kompanio estas efektivegantaj sian heroon lukton kontraŭ la rearmano de Japanio kaj por la subskribo de ĉiuf flanka paĉtraktato kaj nacia sendependeco. Ni kredas ke la laborista klaso de Japanio kiu havas gloran bataltradicion certe frakosas la intrigon de la Usonaj imperiistoj per unuigo de la tuta japana popolo sub la gvidado de la Japana Komunista Partio.

Ni ĉinaj laboristoj kaj la popolo tra la tuta lando rigardas la sorton de la japana popolo kiel nian propran. Ni postulas justan, ĉiuf flankan paĉtraktaton kun Japanio kaj kontraŭas la rearmon de Japanio, por restarigi kiel eble plej frue pacoan vivon por la japana popolo. Ni firme luktos por ĉi tiu celo.

Japanio devas aparteni al la japana popolo kaj la sorto de Azio devas esti decidata de azianoj.

La intenco de la Usonaj imperiistoj fabriki militon kaj ŝtuperrigi la tutan mondon estas kondamnita al malsukceso.

Ankaŭ la ĉefa temo de la amaskunvenoj kaj manifestacioj rememorigantaj la 28an datrevenon de la striko de "7a, Februaro" de la laboristoj de Pekin-Hankou-a Fervojo kontraŭ la de imperiistoj subtenataj militaristoj estas opozicio kontraŭ la Usona intrigo rearmi Japanion. En Pekino, Sanhajo, Mukdeno kaj aliaj grandaj urboj, miloj da laboristoj deestis amaskunvenoj en kiuj la novaj agresaj planoj de Usono estis denuncataj.

Similajn kunvenojn okazigis multaj popolaj organizoj, institucioj kaj partioj tra la tuta lando. La ĉina popolo decideme kontraŭas la intrigon de Usono, kune kun la popoloj de Sovetunio, Aziaj landoj kaj Japanio.

Unu el la celoj de la Ĉina-Sovetunia Traktato de Amikeco, Alianco kaj Interhelpo ja estas malebligti la revivigon de japana armita agreso.

Se Usono arbitre efektivegus sian intrigon rearmi Japanion, la potencaj popoloj de Ĉinio, Sovetunio, kaj aliaj Aziaj landoj certe ne povos ĝia ignori kaj strĉea situacio estigos en la Oriento. Ene tia kazo, la japana popolo estos la unua viktimo de Usono.

Nun la popoloj tra la mondo komprenas ne nur ke Usonaj imperiistoj devas esti venkita sed ankaŭ ke ili povas esti venkita. La nuna intrigo de Usono por aparta paĉtraktato kun Japanio estas senespera barakto sia savi el sia malsukceso en Azio je la kosto de la japana popolo.

La ĉina popolo atente observas kaj decideme kontraŭas la kriman intrigon de Usono rearmi Japanion kaj batalas por ĉiuf flanka, justa paĉtraktato laŭ internacia konsento kaj nemilitarisma, demokratia Japanio, kune kun la popoloj de orientaj landoj kaj Japanio. La justa batalo de la ĉina popolo certe venkos kaj la maljusta agreso ago de la Usonaj imperiistoj certe fiaskos kiel iliaj invadoj al Ĉinio kaj Koreio.



ĈINAJ VIRINOJ MANIFESTACIAS KONTRAŬ LA REARMADO AL JAPANIO

Liberiga Armeo, virinoj de la publiksecura forto, Lernantinoj, flegistinoj en blankaj antaŭtukoj, medicinaj laborantinoj en siaj sommakulaj uniformoj, mahometanaj virinoj en blankaj ĉapo, dommastrinoj en silko kaj pelto kaj budaistaj kaj katolikaj monaĥinoj.

Gvidate de 47 virinaj gvidantoj de Ĉinio, la marŝantoj tendis tiajn sloganojn kiel: "Kontraŭu apartan paĉtraktaton de Usono kun Japanio!" "Frakasu la Usonan intrigon rearmi Japanion!" "Kontraŭu la agreson de la Usona imperiismo en Tajvano kaj Koreio!" "Defendu daŭran mondpacon!"

Hur'as Laboristoj

Je la 30a de januaro, la Tutĉinia Federacio de Laboristoj sendis mesaĝon al la japanaj laboristoj subtenante ilian lukton kontraŭ la aparta paĉtraktato kaj rearma lukton intencataj de Usono. Ekstraktaj legiĝas kiel jene:

La intrigo de Usono subskribi paĉtraktaton kun Japanio sen la partopreno de Ĉinio kaj Sovetunio malobeas ĉiujn inter-aliecajn kontraktojn koncerne Japanion post la Dua Mondmilito. Ĝi subfosas la



MONGOLA PASTISTO KUN SIAJ BOVOJ

ŜEN JU-KO (沈毓珂)

MONGOLIA LOĜANTARO IRAS AL PROSPERO

Feliĉo por Matriĉularo

Pasinteco kaj Estonteco

Unceitej Koŝiun^(*) (翁牛特旗) estas herboriĉa distrikto kuŝanta inter la riveroj Loĥa (老哈) kaj Siramuren (西拉木倫) en Norda Jehol-Provinco (熱河省). Ĝia orienta parto estas vasta ebena kiu kvazaŭ etendiĝas al senlima malproksimo, en ĝia okcidenta parto ondas montoj kaj montetoj, kaj en la mezo kuŝas dezerto. Tamen oni neniel devas kompreni la vorton "dezerto"

laŭ difino donita en la vortaroj, male ĝi estas loko, kie kreskas saliko, efedroj,⁽²⁾ glicirizo kaj aliaj kreskaĵoj kaj taŭgas por ambaŭ ĉasado kaj paŝtado. Tial la mongoloj nomas ĝin "Bajantala" t. e. "riĉa paŝtejo" en la mongola lingvo.

En la pasinteco tiu ĉi paŝtejo apartenis ekskluzive al la princoj kaj lordoj, ankaŭ ĉiuj bovoj, ĉevaloj kaj ŝafoj sur la stepo estis ilia propraĵo. La vastaj mongolaj popolamasoj havis nek teron, nek bovojn, nek ŝafojn. Politike ili estis sklavoj kaj ekonomie kruele ekspluatataj kaj pri ilia kulturo estis des malpli io menciinda.

Post la liberigo en 15. aŭg. 1945 kaj precipe post la agrara reformo en 1947, ilia vivo fariĝas pli kaj pli bona. Kien ajn vi iras, vi vidas gregojn da bovoj kaj ŝafoj. Vi vidas ankaŭ vastajn kampojn kulturitaj laŭ la primitiva metodo de disjeta semado (t. e. oni disjetas semojn inter la herbojn kaj poste turnas malsupren per plugilo la herbojn kune kun la semoj kaj dum aŭtuno oni rikoltas nur la spikojn, forlasante la trunketojn). Ĉiuj loĝantoj surportas novajn vestojn, trinkas lakton de siaj propraj bovinaj kaj loĝas en bumbunoj (Mongoliaj tendoj) aŭ nove konstruitaj aŭ rekalkumitaj domoj. Ili jam komencas iri de matriĉeco al riĉeco. Tial inter la mongoloj disvastiĝas la jena kanto:

*Sur teron matene brilas sunaj radioj,
Sur matriĉulojn tiuj de la Kompartio,
Antaŭe ŝarĝ-tiris ni ĉe sen azeno,
Sed ĉevalojn havas ni post la Kompartia veno.*

*Ni ĉion portis mem de jam miljaroj,
Sed nun servas al ni la kvinbovaj ĉaroj,
Rozfloroj riĉfloras dank' al ter' fekunda.*

Nun Maŭ Ze-tung venas por la viv' abunda.

En Unceitej Koŝiun estas entute 75 administraj vilaĝoj kun 10,143 familioj kaj 45,174 loĝantoj. En 1943, sub la regado de la pupa "Manĉoŭkuo" sin trovis en la tuta distrikto proksimume 45,000 bovoj sed nun la cifero estas 55,000. En 1943 estis 131 plugiloj per kiuj estis kulturataj 175,722 muoj da tero. Nun estas 1,034 plugiloj per kiuj estas kulturataj 409,824 muoj.

En Daŭbu Otok (刀布管子) Kolikuaĵ-distrikto (格立倫區) estas nur 12 familioj kun 53 anoj. Sub la pupa regado krom unu brutar-posedanta familio kaj 3 mezpaŝtistaj familioj la aliaj 8 familioj ĉiuj estis matriĉaj paŝtistoj aŭ dungitaj paŝtistoj. Nun ĉiuj en la otok (vilaĝo) jam fariĝis mez-paŝtistoj. En 1943 estis en la tuta vilaĝo 108 bovoj. Nun estas 237. Do la nombro pligrandiĝas je 119 procentoj. En 1943 la plej alta genera povo de bov-



FLORPREZENTA DANCO DE LA MONGOLA POPOLO

inoj estis 70 % (t. e. 70 bovidoj naskitaj al ĉiu 100 bovinaj) sed nun la proporcio jam plialtiĝas ĝis 90 %. En 1943 la procentoj de mortintaj bovoj (inkluzive de tiuj mortintaj pro malsanoj aŭ mortigitaj de lupoj) estis 70 %. Nun la proporcio malpliĝas ĝis 5.1 %. En 1943 estis 7 plugiloj por kampoj de "disjeta semado" kaj la kvanto de rikoltaĵoj estis 23,700 ĝinoj. En lasta jaro estis 10 plugiloj por tiu celo kaj la kvanto rikoltita estis 33,900 ĝinoj.

En 1943 la tuta vilaĝo estis devigita pagi imposton per 23 bovoj kiuj kostis entute 13,616 ĝinojn da greno. En lasta jaro la tuta vilaĝo kontribuis 2,820 ĝinojn da impostgreno kaj tio

La popolanoj de Nordorienta Ĉinio, nun en la fronto de nacidefendo en la streĉa luktado por rezisti Usonon, helpi Koreion, protekti siajn hejmojn kaj defendi la patrion, jam sukcese plenumis la taskon de ekonomia rekonstruo dum 1950, kaj nun enpaŝas la jaron 1951 kun plena fido je estonta pli granda sukceso.

En la lasta jaro la popola registaro de Nordorienta Ĉinio decidis entrepreni la laboron de ekonomia rekonstruo de sia regiono kun tuta forto. Laŭ la antaŭo fiksita plano la tuta valoro de industria produkto devas esti pliligiĝita je 93 % ol en 1949 kaj ĝia proporcio en la tuta popola ekonomio devas esti levata de 35 % (de 1949) ĝis 43%.

Sed en junio, la Usonaj imperiistoj komencis la invadon kontraŭ Koreio kaj plie disvastigis la militflamon ĝis la landlimo de Nordoriento, Usonaj aeroplanoj agredadis seninterrompe nian aeron, murdis niajn popolanojn. En tia cirkonstanco la nordorientanoj devis unuflanke batali por rezisti Usonajn imperiistojn kaj protekti la sekurecon de sia patrio, kaj aliflanke persiste entrepreni la pezan laboron de ekonomia rekonstruo.

La popolanoj de Nordorienta Ĉinio heroe ludas la duoblan rolon. Ili per seninterrompaj liveradoj de la fortoj homaj kaj materialaj subtenis la ĉinajn popolajn volontulojn, kune kun Korea

Popola Armeo estingi la invadan flamon jam brulantan ĉe la landlimo, donis al la Usonaj imperiistoj severan disbaton kaj akiris la grandiozan venkon; krome samtempe ĉiu persono surprenas sur sin la gloran taskon rezisti Usonon, helpi Koreion, protekti la hejmon kaj defendi la patrion sur sia propra posteno.

Dank' al la unuanima penado de Nordorientaj popolanoj la amika helpado de Sovietiaj spertuloj, kaj precipe la plej klara kono pri la esenco de Usona imperiisma agreso, dum plialtiĝanta patriotisma movado, oni en la venkado de ĉiuj malfacilaĵoj, kiujn donis la Usonaj imperiistoj per sia plivastigita agreso, elmontris la plej grandajn aktivecon kaj kreemon. Pro tio, la jarplano de ekonomia rekonstruo de 1949 ne nur estis plenumita sed ĉe superita. Jen estas komenca statistiko kiu prezentas al la legantoj la grandiozan sukceson de la ekonomia rekonstruo de Nordorienta Ĉinio.

La tuta valoro de la produkto de ŝtataj industrio kaj agrikulturo superis tiun de la jaro 1949 je 65.3 % kaj plenumiĝis la jarplano je 102.7 % kaj la tuta valoro de la industria produkto superis tiun de 1949 je 100.5 % kaj plenumis la koncerne parton de la jarplano je 101.8 %; la tuta valoro de agrikultura produkto pliiĝis je 44.1 % kaj plenumis la koncerne parton de la jarplano je 103.4 %.

estis nur iom pli ol kvinono de la antaŭa pago.

Vivo Abunda

Nun ĉiuj loĝantoj enspezas pli multe kaj elspezas pli malmulte. Pro la starigo de ŝtataj entreprenoj kaj kooperativoj, ruzaj komeristoj ne plu povas trovi okazon por trompi la vilaĝanojn. En 1943 per unu ŝafo ili povis inter-

faris viziton al iu paŝtisto Osurul kiu vivas iom malpli bone ol la aliaj. Lia domo, ĉirkaŭita de longa plektobarilo, konsistis el du ĉambroj kaj estis en tre bona ordo. Oriente de la domo estis staloj por bovoro kaj ŝafaro faritaj el plektobarilo de salikbrandoj kaj altaj je pli ol 3 metroj. Okcidente estis alia ĉirkaŭbarilo kie troviĝis bovaj fekaĵoj kiuj estis utiligitaj por fekundigi la teron. Sude estis legom-gardeno ankaŭ ĉirkaŭita de simila plektobarilo.

"Kiel vi vivas nun?" mi demandis.

"En la tempo de la pupa reĝimo 'Manĉoŭkuo', mi havis ĉe ne unu bovo-haron. En la agrara reformado mi ricevis 11 bovojn. Nun mi havas 16 bovojn, 1 ĉevalon, 1 azenon kaj 6 ŝafojn krom la mortintaj kaj venditaj. Estinte mi estis devigita porti pelton tra la tuta jaro sed ĉi-jare mi aĉetis 25 metrojn da ŝtofo kaj ĉiu el miaj kvar familianoj surmetas novajn vestojn. Jen mi havas ankaŭ pelton surŝtofitan per nigra ŝtofo kaj ĝi estas nun sunumata tie sur la barilo. Antaŭe ni manĝis ĉiutage nenion alian ol branon kaj sovaĝajn legomojn kaj ni estis ofte malsataj. Nun ni ricevas 20 ĝinojn da lakto ĉiutage. Ni kvar trinkas nur 7 ĝinojn kaj restas ankoraŭ 13 ĝinoj. Lastjare ni rikoltis 2,310 ĝinojn da greno sed ni kontribuis nur 145 ĝinojn da impostgreno. Ĉar ni havas pli da greno ol ni bezonas, ni interŝanĝis iom el ĝi por 3 te-brikoj (t. e. te-folioj kunpremitaj en la formon de briko).

Plimultiĝas la Loĝantoj

En la pasinteco, sub la reakcia regado, la nombro de loĝantoj en Interna Mongolio malpliiĝis de jaro al jaro. Laŭ enketo kiun mi faris ĉifoje en Unceitej Koŝiun, ĝiaj loĝantoj jam nun pli kaj pli multiĝas. Kiel ekzemplon ni prenu Floritu (呼力吐) Otok de Laŭfu (老福) distrikto. En 1947 naskiĝis nur unu infano en la tuta Otok. En la vintro inter 1948 kaj 1949

En la supre dirita Daŭbu Otok mi

REFORMO DE LA ĈINA KLASIKA TEATRO

P. Ĉ. Ju (于寶樂)



Lando de Teatro-amantoj Ĉinio estas nacio de teatro-amantoj kaj inter ĉiuj teatraj artoj, la klasikaj teatraĵoj estas eminentaj. Krom la centoj da miloj kiuj ĉiutage vizitas la kinon, la okcidenta-stilan dramon kaj la pli novan formon de teatraĵoj influataj de la revolucia ĵango-o (moderna formo de opera arto devenigita el la popol-teatraĵoj de Nordokcidenta Ĉinio) 3,000,000 homoj ĉiutage amasiĝas en la teatroj, trinkejoj kaj budaj prezentadoj de la klasikaj teatraĵoj. Ekzistas nun en diversaj partoj de la lando ne malpli ol 350,000 aktoroj de 90 diferencaj formoj de tiu ĉi teatra arto. En profesiaj teatroj, de lokaj festoj, amuzoj kaj foiroj, ĉi tiuj artistoj prezentas al entuziasme akceptemaj amasoj la lokajn dramojn, la operon en la formo de *Kunkju*, komikajn dialogojn, popolajn kantojn akompanatajn per la tambureto, dancojn kaj akrobataĵojn. Sed, kiel la aktoroj diras, "Ĉiuj floroj plej bone floras en ĝardeno", en la klasikaj tragedio aŭ komedio kun siaj plenaj scenejaj efektoj (kiel en la *lingkju* aŭ Pekina Opero) tiu ĉi antikva arto de Ĉinio atingas sian plej altan disvolvigon.

Sinsekvantaj talentaj artistoj kun Mej Lan-fang (梅蘭芳) kiel la famkonata stelo, gvidis la klasikan teatron al sia nuna brileco kaj vasta populareco. Sed, kvankam tiu populareco restas senrivala kompare kun la ceteraj teatraĵoj formoj, la klasika teatro nun renkontas novan elprovon, precipe depon la liberigo.

Novaj postuloj al la Teatro La popolamaso, dank' al kies subteno la klasika teatro disvolvigis kaj prosperigis, jam fundamente ŝanĝiĝis dum la daŭro de la revolucio. Ili ekhavas novajn interesojn, novan perspektivon. Ili farigas pli konscia politike ol iam ajn antaŭe. Ili estas inspiritaj per la ideoj kaj idealoj de la Nova Demokratio. Tial ili prezentas novajn modernajn postulojn al la artistoj de la klasika teatro.

Tiu ĉi teatro estas historie la produkto de la feŭda kulturo de Ĉinio kaj estas profunde influita de la filozofio Konfucia kaj Taŭista. Ĝi ankoraŭ estas profunde markita de postsignoj de sia origino. Ĝiaj dramoj propagandis, ekz., la feŭdan koncepton de la heroo, filan piecon kaj lojalecon al la sinjoro aŭ familio super la nacio kaj fundamente fatalisman vidpunkton pri la vivo. Post la alveno de la Nova Demokratio, ĉiuj tiuj ideoj estas forĵetitaj kiel malakordaj kun la novaj kondiĉoj de la socio. La amasa aŭdantaro nuntempe havas novan koncepton pri la heroo: ili konsideras heroo tiun kiu batalas kontraŭ reacia potenco en aferoj rilataj al politika subpremado aŭ amo. La reformo de la Pekina Opero reflektas tiun ĉi novan socian problemon.

La aŭdantaro de la Nova Demokratio rifuzas ĉiun superstiĉon. La nura supernatureco ne plu ekscitas ilian intereson.

Rezulte de sia longa historio de disvolvigo sub la malnova imperia, feŭda

socio kaj la militarista kaj Kuomintang-regimoj, la klasika opero havas multajn elementojn neakcepteblajn al moderna aŭdantaro. La gvidantaj artistoj de la klasika opero tion konscias kaj komprenas ke, sen reformado la arto perdos popularan favoron, same kiel la kunkju-formo de dramo, kiu sin adaptante pli kaj pli al la gusto kaj prejuĝoj de la malnova beletristaro, perdis la popolan nuancon kaj finfine preskaŭ forpasis de la sceno. Ĉi tiu neceso de reformo estis konstata tiel frue kiel la komenco de la Movado de 4. Majo de 1919. Ĝi farigis insista postulo kun la liberigo de la lando el sub la reaciaj fortoj. Depost la 1-a de oktobro, 1949, artistoj de la klasika teatro, kuniĝis kun ĉiuj aliaj artistoj en radikala retaksado kaj reformado de sia arto.

Reformo de la Aktoro Dum la pasinta jaro, la tuta organizo kaj repertuaro de la klasika teatro travivis rapidajn progresajn ŝanĝojn. Atento estis unue

instruantoj kiel Mej Lan-fang, neniam estis donataj iliaj meritaj rajtoj. La socio dum la Mandŭa dinastio lokis ilin malalte en la socia skalo, kune kun dungitaj soldatoj kaj prostituitinoj. Ili estis ĝenerale nesufiĉe pagitaj. Multaj, nepovante sinvivteni, transiĝis en aliajn okupojn. Eĉ tiuj kiuj gajnis la plej laŭtan publikan aplaŭdon havis nur "duklasajn" sociajn rajtojn.

Ĝio ĉi estas nun ŝanĝita. Al teatraj laborantoj estas donata la sama respekto kiel al verkistoj, sciencistoj, pentristoj kaj aliaj cerbo-laborantoj. Por ke ili povu ludi sian plenan parton en la laboro de kultura konstruado, ili estis venigitaj al la politikaj konsilioj de la nova popola ŝtato. Tuj post la liberigo de Pekino, la teatra centro de la nacio, kvar gvidantaj artistoj de la klasika teatro, inkluzive de la famkonataj Mej Lan-fang, ĉefa aktoro de *tan* (heroina rolo) kaj Ĉoŭ Hsin-fang, (周信芳) de *Sanhajo*, famkonata pro sia akto kiel *liŭ ŝeng* (vira rolo), estis elektitaj membroj de la Popola Poli-



FIZIONOMIOJ DE LA ĈINA KLASIKA TEATRO

koncentrigitaj sur personaro de la teatro. Kun la helpo de la Popola Registaro, la Tutĉinia Federacio de Artistoj kaj Verkistoj organizis apartajn studkursojn por la teatraj laborantoj. Ili pli bone konas la politikan situacion kaj la pozicion de arto en socio. Oni helpis ilin kompreni sian pozicion kaj rolon en la nova socio, siajn novajn rajtojn kaj respondecojn. La teatro de Ĉinio ĉiam ludadis edukon rolon, malkaŝe realigante la principon "Arto estas propagando." Nun la aktoroj komprenas tion laŭ la nova marksisma senco. Kiel "ingenieroj de la homa animo", ili ekkomprenas ke ilia amuzado, devas inspiri la popolon per idealoj de la progresema homaro, per fido al la revolucia movado kaj al la krea genio de la popolo kaj ke ĝi devas antaŭeniri kune kun la progresemaj sociaj fortoj kaj samtempe konservi la plej bonan de la kultura heredaĵo de la pasinteco.

Antaŭ la liberigo al la teatraj laborantoj, eĉ tiel grandaj artistoj kaj

tika Konsilia Konferenco kaj partoprenis la organizon de la Centra Popola Registaro.

Ĉiuj aktivaj teatraj laborantoj rapide trovis sian propran lokon en la prosperiga teatra vivo de Nova Ĉinio. Multaj estis invititaj al ŝtato-patronataj dram-organizaĵoj por helpi al revizio de klasika repertuaro konforme al modernaj ideoj. Tiuj ĉi inkluzivas Vang Jaŭ-ĉing, (王瑞卿) nun 70-jaran, la instruisto de Mej Lan-fang, kiu nun instruas en la nova Ŝtata Drama Akademio.

Reformo de la Teatraĵoj Ekde tiam kiam la Movado de 4. Majo etendiĝis al la teatra rondo, ekestis laborantoj de la klasika teatro kiuj penadas por reformo de sia arto kaj igas ĝin pli konforma al la hodiaŭa revolucia realo. Tamen, ilia klopodo estis malhelpata kaj preskaŭ tute nulgita de la reacia cenzuro sub la militarista kaj Kuomintang-regimoj. Multaj artistoj,

kiel Mej Lan-fang, strebis laŭ nerckto vojo por atingi tiujn progresemajn celojn. Ili substrekis la pozitivajn demokratiajn ideojn implicitajn en la malnovaj dramoj, precipe tiujn kiuj denuncis la korupton de la oficistoj aŭ la malvirtecon de la subpremantoj. Nun post la liberigo kaj la aliĝo de la politika nivelo de ĉiuj teatraj laborantoj, la tuta teatra rondo estas mobilizita por ĉi tiuj progresemaj celoj sub la gvido de la Popola Registaro kaj la Ĉina Komunista Partio. La movado por reformo tiel faras rapidajn paŝojn dum la pasinta jaro. Fiksita estas la principo ke neniu el la ekzistantaj teatraĵoj estu malpermesita kategorie krom tiuj kun radikale reaciaj karakterizoj kaj se revizio estas bezonata, ĝi estu farata kun zorgemo. Tiuj scenoj kiuj pluŝadas la ideon de despotismo aŭ kuraĝigas sklavajn mensojn estu senkompatate forĵetitaj. Tiuj kiuj esprimas ideojn de patriotismo, aŭ tiuj kiuj montras la kuraĝon, diligentecon aŭ ŝaĝecon de la popolo estu konservataj kaj disvolvataj.

Ekzemple, la moderna adapto de *La Monumento de La Ling* (李陵傳) reduktas la elementon de malforteco kaj venikismo de la heroo, la maljuna generalo Jang Jeh (楊業) en lia lukto kontraŭ la invado de la Kin (金) Imperiestro kaj la perido de lia samlandano Pan Hung (潘洪). La emfazo nun estas sur lia kreskanta justeca indigno kontraŭ la interna kaj ekstera malamiko de lia lando. En *Revenĝo de la Fisisto* (打漁殺家), la malamo de la maljuna fisisto kontraŭ la bienulo, kiu kuele eltordis el li la fruktojn de lia laboro, estis antaŭe kaŝita per la komika karaktero de la malica lakco de la bienulo. Plue, la klimakso de la teatraĵo, kie la fisisto mortigas la bienulon, estis kutime ellasita el la prezentado en la pli postaj tagoj de la imperiestroj aŭ sub Kuomintang. Nun la origina emfazo de la dramo estas restarigita.

Pli klara linio nun estas desegnita inter superstiĉo kaj fabelo, inter vulkanto kaj pura amo. En la origina *Rakonto pri la Blanka Serpento* (白蛇傳), la heroino, blanka serpento kiu alprenis homan formon, estas forprenita for de sia edzo per la intrigo de Fa Haj (法海), malvirta abato kiu reŝanĝis sin en serpento. Ŝi luktas obstine kvankam sensukcese kontraŭ sia malamiko, por reaktiri sian homan formon kaj la amon de sia kunulo. En la nuna prezentado, la atmosfero de mistikismo estas forigita. La heroino personigas veran amon triumfan, malgraŭ la tragedia fino, super la malbonaj fortoj de antaŭjuĝo.

Ne malpli ol 72 de la malnovaj operoj estas tiele adaptitaj en la pasinta jaro. La novaj prezentadoj ege interesas la aŭdantaron kaj en kelkaj okazoj viglaj interdiskutoj estas komencitaj. Tio rezultas en pluajn plibonigojn. Responde al la popola postulo la nombro de nove adaptitaj operoj el la multaj centoj da ekzistantaj teatraĵoj pli kaj pli grandigas.

Kiel Ĉoŭ Jang (周揚), vicministro de la Ministerio de Kulturoj Aferoj, rimarkis en sia konkluda parolado de la Tutĉinia Konferenco de Drama Laboro ĉiuj diversaj formoj de la klasika drama arto estas nun aktive kuraĝigitaj kaj disvolvataj sed estas neeviteble ke iuj antaŭeniroj pli rapide kaj pli certe ol la aliaj. Tiuj kiuj servas al la popolo plej bone postvivos kaj plej bone prosperigos.

La artistoj de la klasika teatro decidis levi sian arton al ankoraŭ pli alta nivelo de perfekteco kaj populareco kiel renaskita arto de la nova popola Ĉinio. Neniu dubas ke ĝi havas brilan estontecon.

Fsp-ĝis Censinio





Je la 29-a de lasta decembro publikigis sur la Popola Tagjurnalo Pri la Praktiko (實踐論) la plej grava, brila filozofia traktato de Prezidanto Maŭ Ze-tung. Ĝi koneize kaj precize analizis la rilaton inter kono kaj socia praktiko kaj elmontris funde kaj konkrete la gravajn erarojn de dogmismo kaj empiriismo. En tiu ĉi traktato Prezidanto Maŭ Ze-tung pluan paŝon disvolvis la marks-leninisman dialektikan materialismon pri la fundamentaj principoj de la proceso de kono, pri la funkcio de praktiko en la proceso de kono, kaj pri tiu de revolucia teorio en la revolucia batalo. Tiu ĉi verko fakte ludis jam gravan rolon en ĉina revolucio de post 1937. Antaŭ tiam parto de la revoluciistoj ankoraŭ katenigis je dogmismo aŭ empiriismo. La nuna publikigo certe havas grandan signifon por la filozofia studo en Nova Ĉinio.

Sub la iniciato de la Kultura Fakto de Orientĉinia Milita Politika Konsilo je la sepa lastmonate malfermiĝis en Sanhajo Lusin-Muzeo. Ĝi situas en n-ro 9 de Talu-sineun (大陸新村) de Sanjin-strato (山陰路), la malnova loĝejo de s-ro Lusin. Ĉiuj ĉambroj de la Muzeo estas aranĝitaj laŭ la origina ordo

antaŭ lia morto. En la najbara domo n-ro 10 ekspoziciigas la postlasitaj objektoj, verkoj, manuskriptoj kaj ĉiuj memoraĵoj de s-ro Lusin. Prepara laboro por tiu Muzeo komenciĝis jam de lasta aŭgusto, kaj por tio foje ankaŭ s-rino Lusin devis iri al Sanhajo por partopreni la laboron. La aliaj konatoj de s-ro Lusin, ekzemple s-roj Peng ŝjue-feng (馮雪峯), Jang Ĉi-jun (楊雲雲) kaj Bakin (巴金) ankaŭ multe helpis. Ĉe la malferma soleno ĉestis Ĉen Ji (陳毅), la urbestro de Sanhajo, kaj multaj literaturistoj restantaj en Sanhajo. Ĝin honoris ankaŭ V. N. Rogov, la estro de la Ĉinia Filio de TASS.

Akomanante la antiagresan movadon kontraŭ Usono lastatempe land-skale disvolvigas en Ĉinio la sendependigo de kulturaj kaj religiaj institucioj antaŭe finance subtenataj de la imperiistoj eksterlandaj. Jam de lasta decembro Kuo Mo-ĵo, vic-ĉefministro de la Centra Popola Registaro anoncis la decidon forŝiri ĉiajn rilatojn kun la imperiistoj en la kulturaj entreprenoj. Ĉar ni, ĉinoj bone komprenas kian spiritan sklavigon la imperiistoj volas akiri el tiuj "kulturaj" institucioj. Precipe post la liberigo ni jam trovis multajn intrigojn faritajn de la imperiistoj en tiuj "kulturaj" institucioj. Tio estas netolerebla por la ĉina popolo. Tial estas decidite ke ĉiuj kulturaj, edukaj kaj religiaj institucioj antaŭe finance subtenataj de la imperiistoj estu ŝtatigitaj aŭ ad-

ministrataj memstare sub la helpo de la Centra Popola Registaro. Tiu decido estas vaste aprobita de la universitatoj, mezgradaj lernejoj, hospitaloj kaj religiaj organizoj, fonditaj de la imperiistoj. Ĉiu el ili senescepte malkaŝis la intrigojn de la imperiistoj kaj esprimis sian indignon kaj decidemon forŝiri ĉiujn rilatojn kun la imperiistoj. La Usonaj imperiistoj ankoraŭ revas konservi por si tiajn lastajn bastionojn en Popola Ĉinio per la allogo depluaj financaj helpoj al la estroj de la universitatoj, sed ankaŭ tio renkontis indignan rifuzon kaj plene fiaskis.

Kvar Pollandaj studentoj atingis Pekinon je la 25-a lastmonate. Ilin bonvenigis en la Pekina Stacio la reprezentantoj de la Alteduka Fakto de la Eduka Ministerio de la Centra Popola Registaro, la Tutĉinia Studenta Federacio, La Studenta Fakto de la Novdemokratia Junula Ligo. En la sama vespero ili estis akceptitaj de la Eduka Ministerio. Estas decidite, ke ili lernos en Ĝinghua-Universitato (清華大學).

Ne estas, ke neniu...

—Ĉang Ming-ĉuan (張明權)—

Ne estas, ke neniu
Kantas pli melodie,
Ne estas, ke neniu
Amas min pli pasie,
Ne estas, ke neniu
Estas pli bela,
Ne estas, ke neniu
Estas pli klera —
Divenu,
Per kio estas katenita mia kor' fieraf'

Surbranĉe kreskas floro,
Surakve reĝas pramo,
Kaj sur progreso via
Baziĝas mia amo.
La flor' levigas kun la branĉ' kreskanta—
La pramo—kun akvoleviĝ' subita,
Se ĉiun tagon ol alian
Via progreso estos pli rapida,
Do mia amo por vi ankaŭ
Fariĝos tag-post-tage pli solida.

Trad. S. J. Zee

Esperanto Devas Servi al la Paco

Karaj ĉinaj gesamideanoj!

La granda intereso pri Esperanto en via lando sendube havos gigantan influon je nia movado.....Nia movado, kvankam jam longe konata, ne tre rapide progresas. Sed nun kiam tiel granda kaj progresema lando kiel la via favore akceptas nian lingvon, nia ideo havos eblecon venki en la tuta mondo. Mi tre admiras kaj estimas vian novan, progreseman registaron,



kiu favoras nian movadon. Tiu fakto kuace kun multaj aliaj montras, ke ĝi deziras la plej bonajn kulturajn kaj amikajn interrilatojn kun la tuta cetera mondo. Mi admiras kaj estimas la grandan ĉinan popolon, kiu nun ne havas alian deziron ol resti en paco, konstrui sian landon kaj havi pacajn interrilatojn kun la tuta cetera mondo. Se la popoloj de la cetera mondo nur povus provi tion kompreni! Sed bedaŭrinde oni povas ofte rimarki la kontraŭon! Oni nun vidas la abomenan spektaklon, ke la krima registaro de Usono, kune kun grupo de malmoralaj servistadoj de alia nacieco kruele murdadas kaj detruas la najbaran landon Koreion kaj ke tiuj samaj krimuloj ankaŭ senese atakas vian teritorion kaj popolon. Samtempe aliaj difonoj en la manoj de la militkrimuloj, la registaroj en okcidenta Eŭropo, plene kriadas ke "Ĉinio atakas Usonon!" Sed feliĉe la nombro de dupiedaj azenoj, kiuj kredas tian mallogikan kaj ridindan mensogon, ĉiutage malkreskas. Kelkfoje oni ankaŭ ĉi tie aŭdas la stultan esprimon, ke la registaro de via lando nur reprezentas tre malgrandan grupon. Sed nur individuoj, kiuj ne scias, kion signifas logika pensado, povas havi

tiun opinion. En la nuna momento ekzemple, la granda nombro de ĉinaj volontuloj batalante en Koreio ja montras ke la popolo de via lando tre bone komprenas la mondosituation. Tiuj volontuloj efektive estas batalantoj por la paco, ne nur por la paco kaj libereco en la Oriento, sed ankaŭ por nia libereco! Tial mi esperas el tuta koro, ke la popoloj de Usono kaj de ĉiuj eŭropaj kolonioj baldaŭ sukcesos devigi

la militkrimulojn desigi sian abomenan militon kontraŭ libereamantaj popoloj en la tuta mondo!

Pri la Esperanto-movado ĉe ni vi certe jam estas informitaj. Nun mi volas ankoraŭ ripeti, ke vi nun havas eblecon tre bone instigi la movadon ĉe ni. Vi havas eblecon instigi la esperantistojn ĉi tie, ke ilia movado ne fariĝu mem-ĉelo, sed ke ĝi povos servi al paco kaj al progreso de la hamaro. Ĉar oni ne ĉiam fariĝas ĝoja, legante E-gazetojn en Okcidenta Eŭropo. Ekz. en "Svenska Esperanto-Tidningen" (en septembro, mi pensas) iu esperantisto admonis la samideanojn ne partopreni la porpacaĵan movadon kaj ne subskribi la Stokholman rezolucion! Sed pri tio, karaj ĉinaj samideanoj, ne pensu ke la tuta esperantistaro ĉe ni servas kiel ĉo de Truman! Ni anoj en la Porpaca Komitato Esperantista de Stokholmo, daŭrigos nian laboron kaj se ni povos kalkuli je helpo de via flanko, nia laboro estos multe pli facila.

Mi deziras al via movado plenan sukceson, ĉar "La sukceso de E-o en Ĉinio signifas ĝian sukceson en la tuta mondo!" Vi prava! Al via granda lando kaj popolo mi deziras daŭran pacaĵan kaj rapidan progreson! Vivu la popoldemokrata Ĉinio!

Gustav Nilsson, Svedio

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- BELGIO:** Tousseijn Camille, 35 Statiestraat, Jabbeke (w. VL.) (Jarabono: 50 br.)
Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10 Bruselo.
- BRITLANDO:** Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W. C. 1. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
- ĈEĤOSLOVAKIO:** Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. ĈSR-Slovakio. (jarabono 50 kŝ.)
Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. 66,
- FINNLANDO:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)
- FRANCIO:** Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol—PARIS—X. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)
- GERMANIO:** Arthur Schulze, Berlin-Lubars, Kolonie, Waldesfrieden 77. (Jarabono: 6 D.M.)
Erich Rödel, Leipzig W 33. Becherstr. 10.
- HUNGARIO:** IBUSZ, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 20 forintoj)
- ITALIO:** Itala Laborista Esperanto-Asocio, Via Modena 33—Torino. (Jarabono: 400 liroj)
- IZRAELIO:** Bencion H. Danon. Kibuc Afikim, (Jarabono: 400 prutoj)
- NORVEGIO:** Norvega Esperantisto, Redaksjonens, Boks 942, Oslo. (Jarabono 6 kronoj)
- POLLANDO:** Isaj Dratwer,—Asocio de Esperantistoj en Pollando Warszawa Marszalkowska 81/32 (Poŝtĉeka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 12 zl.)
- RUMANIO:** Rumana Esperantista Societo, București I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- SVEDIO:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 kronoj)

Rim.: 1) Senpagan specimennon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, pagu laŭ la supra tarifo.
2) Legantoj en ceteraj landoj povas aboni nian gazeton ankaŭ ĉe iu el la supraj perantoj al kiu li trovas rimedon pagi aŭ rekte ĉe nia administracio per internaciaj respond-kuponoj (1 respond-kupono por ĉiu ekzemplero) aŭ samvaloraĵ novaj esperantaj libroj, sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn.
3) Korrespondan anoncon ni ne akceptas pro manko de spaco.

國內定價：每期刊價一元五角。全年十二期售價十八元。平寄郵費在內。掛號另加